BJALISTOKO

Urbo en nordorienta Pollando, ĉe la historiaj limoj kun Litovujo kaj Belorusujo (aŭ Blankrutenujo); pollingve Białystok, litove Balstogė, blankruse Bjelastok (Беластоĸ), ruse Bjelostok (Белостоĸ), jide Byalistok (קְאטסיל־איב), germane Bialystok. Kun nuntempe 293 000 enloĝantoj Bjalistoko estas la plej granda urbo en nordorienta Pollando, kaj samtempe ĉefurbo de la podlaĥa vojevodio.

La etimologio de Białystok havas polan kaj litovan versiojn. Laŭ la pola klarigo Biały signifas blanka, stok koncernas riveron, akvo(el)fluon, eble eĉ krutan (mal)deklivon. Tra la urbo fluas la rivero Biała. Ĉi tiaj toponimoj estis kutimaj en Mazovio-Podlaĥio. Laŭ la litovlingva klarigo bala signifas marĉon, stogė – tegmenton, sekve tegmenton super la marĉo (en la prusa tegmento estas stog(i)s). La flago de Bjalistoko konsistas el du partoj: pola (supre) kaj litova (malsupre).

Balta-litova periodo: Antaŭ la elformiĝo de Litovujo kiel politika ento la podlaĥa regiono troviĝis en la malfrua mezepoko rande de la loĝlokoj de slavaj (polaj)[1] kaj baltaj triboj, de Kieva Rusujo kaj de la influo de la Ordeno de Glavofratoj kaj do ĉiam estis en pozicio de limzono. Je la hodiaŭa tereno de Podlaĥio ĝis la rivero Njemeno (Nemano) etendiĝis la okcidentbalta tribo de la jotvanoj (aŭ jatvanoj, sudovanoj),[2] kiu estis parenca al la prusoj.[3]

La historiaj komencoj de Bjalistoko estas legendecaj. Laŭ iuj fontoj[4], la litova grandduko *Gedimino* (1316-41) komencis la urbon en 1320. Tamen kiel fondodatoj validas la jaroj 1437, 1514, 1547. En podlaĥaj dokumentoj de la 14a jarcento aperas la nomo Bjelŝĉani Stok. Kadre de la kristanigo de la lando en 1385 (Unio de Krevo) alvenis germanaj misiistoj. En 1426 *Vitaŭto* (1392-1430), alia fama reganto de la Litova Granda Duklando, transdonis la lokon al *Mateo de Tykocin.*

Pola(-litova)/nobela periodo: Iam meze de la 15a jarcento Kazimiro/Kazimierz IV Jagiellończyk (litove: Kazimieras I Andrius Jogailaitis), grandduko de Litovujo kaj reĝo de Pollando, filo de Jogaila (Władysław II. Jagiełło),[5] havigis la terenon al la posteuloj de la litova magnata familio *Raczko Tabutowicz,* linio Żmudzki, kiu devenis de Samogitio[6]. Sojle de la 16a jarcento ĝia nova mastro fariĝis Mikołaj *Raczkowicz,* kiu estis nepo de Tabutowicz kaj kiu forpasis en 1520. En iu dokumento de Mikołaj de la jaro 1541 la mencio de Bjalistoko estis konfirmita. En 1547 la bjalistokaj bienoj transiris al la litova familio *Wiesiołowski* (Ogończyk) pro la edziniĝo de la vidvino de Raczkowicz, Katarzyna Wołłowiczówna, kun Piotr Wiesiołowski. Ĉi tiu kovna kaj

[1] Ŝajnas, ke la kontrolo fare de la dinastioj de la piastoj etendiĝis ĝis Podlaĥio.
[2] La termino mankas en NPIV aŭ en pli granda nacilingva vortaro. Vd. ankaŭ http://www.suduva.com
[3] Vd. la artikolon *Zamenhofa Bjalistoko* de Vytautas Šilas en Litova Stelo, decembro 2008, p. 9-11.
[4] Ekzemple laŭ la frapvorto Białystok en Słownik geograficzny Królestwa Polskiego i innych krajów słowiańskich. 1880-1914. Vol. I, p. 199; aŭ en Encyklapedya Historyi Belarusi, Minsk 1993, vol. I, p. 488 (kiu baziĝas je Studia materiały do dziejów miasta Białegostoku, Białystok 1968). Detala historia skizo de Bjalistoko precipe kun emfazo de la pola dimensio estas publikigita en la oficiala retujo de la Urbo Bjalistoko.
[5] Kiu estis filo de Algirdas/Olgerd, kiu estis la filo de Gediminas. Vytautas estis la filo de Kęstutis, kiu estis alia filo de Gediminas. Vd. en Esperanta Vikipedio sub: Listo de regantoj de Litovio.
[6] Temas pri la litova regiono de Žemaitija.

tykocina starosto apartenis al la familia rondo de reĝo Zygmut Augusto. Wiesiołowski mortis en 1556. En 1569, okaze de la Lublina Unio, en kiu estis starigita la komuna pola-litova respubliko, Podlaĥio falis sub la suverenecon de la Krono. Post la morto de Kristofo Wiesiołowski (1637),[7] t.e. la plej lasta reprezentanto de tiu familio, kiu ne postlasis idojn, la bjalistoka lando transiris al la starostejo de Tykocin kaj fariĝis respublika posedo. Pro meritoj en la kontraŭsveda milito ĉi tiu starostejo estis donita, en 1659/60, kompense al hetmano *Stefano Czarniecki.*[8] Post la morto de Czarniecki la koncernaj posedaĵoj transiris, tra lia fratino Katarzyna Aleksandra, la edzino de marŝalo Jan Klemens Branicki (avo), kaj tiel finfine al la nobela familio de *Branicki (de Gryf).*[9] Sub lia filo Stefano Mikołaj Branicki, vojevodo de Podlaĥio, la defenda gotika kastelo transformiĝis al baroka palaco, kaj la rezidejo ricevis en 1691 aŭ 1692 de reĝo Jan III Sobieski la urbajn rajtojn. La sola filo de Stefano Branicki kaj de Katerina de Sapieha[10] estis *Jan Klemens Branicki* (1689-1771). Kiel plej lasta vira reprezentanto de sia parto de la Branicki-familio, Jan Klemens estis signifa kortega funkciulo, kampohetmano, granda kronhetmano, krakova kastelestro, krakova vojevodo ekde 1746, senatano kaj do unu el la plej elstaraj aristokratoj en la 18-jarcenta Respubliko de Ambaŭ Nacioj[11], kiu posedis 12 urbojn, 257 vilaĝojn kaj 17 palacojn. Kun sia edzino Izabela Elżbieta Poniatowska, la fratino de Stanislavo Aŭgusto Poniatowski (1732-98), Jan Klemens kondukis Bjalistokon, kiu estis nomata la Versajlo de Pollando, al la ora epoko, starigante pompan kortegon kaj organizante riĉan kulturan-socian programon, por allogi multajn elstarajn artistojn, sciencistojn kaj intelektulojn. La bjalistoka kortego de Branicki ricevis la viziton de polaj reĝoj, inter alie Poniatowski, la plej lasta reganto de la Pola-Litova Respubliko mem, sed ankaŭ de monarkoj de Saksujo aŭ de la rusa caro Paŭlo I, de Jozefo II, imperiestro de Aŭstrujo kaj de Ludoviko XVIII, reĝo de Francio, kiu serĉis rifuĝejon ĉe Branicki. La 1an de februaro 1749 Bjalistoko ricevis de la reĝo Aŭgusto III la magdeburgajn urbajn rajtojn. En 1753 Bjalistoko suferis grandan incendion kaj estis rekonstruita kaj kompletigita laŭ nova arkitektura plano. En 1761 la nova urbodomo estis finkonstruita. En 1769 estis eldonita liberala leĝo, kiu permesis al ĉiuj metiistoj labori sendepende de ilia deveno.

Sed ne ĉiuj tempoj estis tiom gloraj kaj harmoniaj. La 17an de julio 1769 okazis en Olmonty apud Bjalistoko stranga batalo: inter la Bara Konfederacio[12] kaj Ruslando, en kiu partoprenis kelkmil soldatoj kaj en kiu mortis aŭ vundiĝis kelkcent. La 9an de oktobro 1771 Jan Klemens Branicki mortis. Sekve la palacon heredis Izabela (+1808),

---

[7] Supozeble Wiesiołowski anstataŭ Wiesołowski; vd. http://pl.wikipedia.org/wiki/Krzysztof_Wiesiołowski

[8] vd. ekzemple http://pl.wikipedia.org/wiki/Stefan_Czarniecki

[9] Ekzistis du linioj de la familio Branicki: Gryf, la pli maljuna, kaj Korczak, la pli juna. Vd. http://pl.wikipedia.org/wiki/Braniccy

[10] Sapieha estis fama nobela familia nomo el Blankrutenio. Nomojn de polaj nobelaj familioj vd. en nacilingva Vikipedio sub la frapvortoj ‚Magnat', Litauischer Adel' kaj ‚Litewska szlachta'.

[11] Komuna ŝtato de Pollando kaj Litovujo. Pollingve ĝi nomiĝis: Rzeczpospolita Obojga Narodów; litove: *Žečpospolita* lub *Abiejų tautų respublika*; blankruse: Рэч Паспалітая lub Рэч Паспалітая Абодвух Народаў; ukraine: Річ Посполита; latine: *Res Publica Utriusque Nationis*. En ĉi tiu komuna ŝtato Litovio havis la statuson de Granddukujo, dum Pollando oficiale estis Reĝlando.

[12] La Bara Konfederacio (1768-1772) konsistis el grupo de polaj nobeluloj, kiu estis fondita la 29an de februaro 1768 en la fortikaĵo de Bar en Podolio kun la celo defendi la internan kaj eksteran sendependecon de Pollando kontraŭ Rusujo kaj ties reprezentanto en Varsovio, princpo Nikolaj Repnin.

poste la nepoj Felikso kaj Jan *Potocki* kaj ilia fratino Maria Mastowska.[13] Interese: la dua edzo de Izabela, Andrzej Mokronowski, estis unu el la fruaj framasonoj en Pollando.[14]

Kadre de la administra reorganizado de la Pola-Litova Respubliko laŭ decido de la Sejmo en Grodno de la 23a de novembro 1793 estis kreita la podlaĥa vojevodio, kiu apartenis al la pola flanko (dum la grodna vojevodio apartenis al la litova flanko).

Okaze de la insurekcio de Tadeusz Kościuszko en junio 1794 tra Bjalistoko marŝis divizio de generalo Andreo Karwowski.

Prusa periodo: Kadre de la tria dispartigo de Pollando-Litovio en 1795 la regiono de Bjalistoko estis enkadrigita en Prusujon, pli precize en la provincon de Novorienta Prusujo, kiu ekzistis ĝis 1807. Ĉi tiu unuo estis la plej orienta parto de la Prusa Reĝlando (1701-1918), kie loĝis grandparte blankrutenoj. En 1802 la familio Potocki vendis Bjalistokon al la prusa reĝo Friedrich Wilhelm III. kontraŭ 270 970 taleroj. En tiu mallonga germana periodo estis instalita la stratkvartalo Kleindorf. Komence de la 19a jarcento Bjalistoko estis ne pli ol vilaĝo kun 400 loĝantoj. La sekva industriigo faris el ĝi grandurbon kun 61 500 homoj en 1913, kies loĝantaro plimulte estis juda (vd. sube).

Rusa periodo: En la Packontrakto de Tilsito de la 7a de julio 1807 Napoleono, kiu militis kontraŭ Prusujo kaj Ruslando, cedis Novorientan Prusujon, en kiu troviĝis Bjalistoko, al caro Aleksandro I. Prusujo ricevis la pagon de 20 223 arĝentaj rubloj por ĝi. Sed per tio la napoleona milithistorio ne estis finita. Kadre de la granda militiro kontraŭ Ruslando de somero 1912, en kiu partoprenis 600 000 soldatoj, kaj kiu kulminis en la batalo de Borodino, la konkero de Moskvo kaj kun 275 000 mortintoj kaj 200 000 kaptitoj, la 3an de julio 1812 napoleonaj soldatoj trainvadis ankaŭ Bjalistokon. Dek tagojn poste la loĝantoj de Bjalistoko proklamis sub la gvido de Zawadzki la reunuiĝon kun la Pola Respubliko. Sed la 4an de aŭgusto la urbo estis invadita de la rusa armeo kaj sekve eldonita al la rusiga politiko. Junaj patriotaj aktivistoj estis deportitaj al Siberio.

Ekde 1808 Bjalistoko estis la centro de la samnoma distrikto. Laŭ decido de la Viena Kongreso de 1815 Pollando estis denove dividita. Nome la Pola Duklando (fondita de Napoleono en 1807) estis trancita inter Prusujo kaj Rusujo kaj anstataŭita de la t.n. Pola Reĝlando (onte konata kiel 'Kongresa Pollando') kiel protekorato de la caro. Bjalistoko situis ekster ĝi.

La 13an de decembro 1830 la cara reĝimo proklamis la militan staton lige kun la novembra ribelo en Pollando. Sed kiel rezulto de la pola ribelo la carismo celis puni la pollandan industrion, kies centro estis Lodzo, kaj iniciatis novan industrian zonon ekster la limoj de la teritorio de la Pola Reĝlando. Do, Bjalistoko profitis, en sama senco ankaŭ post la pola ribelo de 1863, kaj fariĝis la tria plej grava industria ubo post Moskau kaj Lodzo (Maimon). En 1834 estis starigita dogana limo inter Pola Reĝlando kaj Ruslando. En 1843 Bjalistoko estis enkadrigita en la gubernion de Grodno,[15] kiu situis ekster la

[13] Vd. http://pl.wikipedia.org/wiki/Potoccy

[14] Kiel oni ĝis nun povis rimarki, nur nobeloj (kaj ekleziuloj, kies eventuala rolo ĉi tie ne estas reliefigita) ludis la ĉefan rolon en la historio, dum la simplaj homoj, t.e. civitanoj (burĝoj) kaj kamparanoj, estis ekskluditaj de la (pola) 'nacio'. Nur kun la Franca Revolucio la t.n. Tria Ordo, t.e. la civitanoj kaj kamparanoj, komencis alkalkuli sin ankaŭ al la nacio.

[15] En 1891 en la gubernio de Grodno loĝis entute 1 509 728 personoj (776191 viroj kaj 733837 virinoj), laŭ konfesioj jene: ortodoksuloj 827 724, katolikoj 384.696, judoj 281 303, protestantoj 13.067, islamanoj 3 238. Laŭ preĝejoj: ortodoksaj: 4 monaĥejoj, 490 preĝejoj kaj 54 kapeloj, 57 sinagogoj kaj 316

Pola Reĝlando (t.e. ‘Kongresa Pollando’). En 1857 loĝis en Bjalistoko 13 787 homoj en 780 domoj, en 1889 estis nombritaj 56 000 loĝantoj en 4127 domoj. En 1891 la loĝantaro de Bjalistoko konsistis el 77.9% judoj, 9.5% katolikoj, 7% ortodoksuloj, 6% protetantoj. En la bjalistoka regiono poloj formis 33.9% de la loĝantoj, katolikoj 47,2%, blankrutenoj 26,2%, ortodoksuloj 20,1%, germanoj 3,6%, protestantoj 3,5%.[16] Krom plimulte judoj kaj poloj, rusoj kaj germanoj vivis en Bjalistoko ankaŭ belorusoj (blankrutenoj), tataroj kaj litovoj.

Interesa historia detalo estas, ke la atencanto kontraŭ caro Aleksandro II. en 1881 kun la mortiga bombo estis Ignatij Grinewitzky el la pola nobelularo. Hazarde kiel Zamenhof li vizitis la realan gimnazion de Bjalistoko ! Sekve al tiu atenco la naciaj malplimultoj en la Ruslanda Imperio, precipe poloj, judoj, ukrainoj, estis ankoraŭ pli forte subpremataj ol antaŭe.

Intertempe komenciĝis la industriiĝo de la urbo, kaj Bjalistoko ricevis ankaŭ stacidomon de la fervojo inter Varsovio (174 km fore) kaj Sankt-Peterburgo (882 km fore). La fabrikoj de la ‘Manĉestro de la Nordo’, kiel Bjalistoko estis nomata, apartenis komence precipe al germanoj, poste ilin aĉetis judaj komercistoj. Lige kun la industrio alvenis multaj judoj el Ruslando, tiel nomataj litvaj judoj (aŭ litvakoj, pole litwacy), kiuj ĝis la fino de la jarcento formis ĝis 70 procentojn de la loĝantaro (vd. sube), kompare kun 20% da poloj kaj 5% da germanoj (ĉ. 1860). La 24an de aprilo 1863 komenciĝis la pola ribelo ankaŭ en la bjalistoka lando. En 1895 eksplodis striko de laboristoj, sekve naskiĝis la socialdemokrata movado. Fine de la jarcento Bjalistoko estis proleta urbo.

20a jarcento: La revolucio de 1905 en Ruslando havis sangajn konsekvencojn. En 1906 okazis la fama kontraŭjuda pogromo en Bjalistoko, al kiu Zamenhof publike reagis (vd. sube). Dum la unua mondmilito en 1915 Bjalistoko estis okupita de la germanoj. Dum la unua mondmilito la nombro de la loĝantaro draste falis. La 19an de februaro 1919 la germanoj forlasis Bjalistokon kaj transdonis ĝin al la polaj aŭtoritatoj. Post 123 jaroj de ŝtata neekzistado Pollando restarigis sian aŭtonomion. La 1an de aŭgusto formiĝis la bjalistoka vojevodio. Laŭ la t.n. linio de Curzon proponita la 8an de decembro 1919 en Parizo kiel pola-ruslanda demarkacia limo, Bjalistoko situis okcidente de la kurzona linio. La efektiva limo inter Pollando kaj Ruslando efektive fariĝis limo ĉirkaŭ 250 kilometrojn oriente de la kurzona linio,[17] kaj kadre de la pola ŝtato tiam situis ankaŭ la urboj Grodno, Bresto, Pinsko, Vilno kaj Lvovo.

En la pola-rusa milito la 28an de julio 1920 la urbo estis okupita de la bolŝevikoj, kiuj povis esti forpelitaj la 22an de aŭgusto. Tuj poste la bjalistoka vojevodio restariĝis. En la intermilita tempo la loĝantaro de Bjalistoko kreskis de 77 000 al 105 000 homoj, sed la juda parto malkreskis. En 1931 la urba loĝantaro konsistis el poloj (51%), judoj (42%), rusoj (3%), germanoj (2%), blankrutenoj/belorusoj (0,5%). En tiu tempo la urbo estis rekonstruita, bedaŭrinde ortodoksuloj estis persekutataj.

---

preĝejoj-lernejoj, katolikaj: 2 monaĥejoj, 92, preĝejoj, 57 kapeloj; protestantaj: 7 preĝejoj kaj 6 kapeloj, 3 moskeoj. (Laŭ Энциклопедический словарь Брокгауза и Ефрона: В 86 томах (82 т. и 4 доп.). Санкт-Петербург: 1890-1907.)

[16] Laŭ indikoj en Banet-Fornalow, Zofia: Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko. Svidniko 2003, p. 16.

[17] vd. http://eo.wikipedia.org/wiki/Curzon-linio

La 15 de septembro 1939 Bjalistoko estis okupita de la germana armeo, sed nur por la daŭro de unu semajno. La 22an de la sama monato sovetiaj soldatoj enpenetris la urbon kaj forpelis la germanojn. La nova pola-sovetia demarkacia linio de la 28a de septembro 1939 situigis Bjalistokon oriente de tiu limo, kaj sekve al la sekreta aldona protokolo de la germana-sovetia pakto (Molotov-Ribbentrop), la 29an de novembro 1939, la urbo kaj vojevodio estis alkroĉita al la Belorusa Socialisma Soveta Respubliko. Dum la sovetia okupado en aprilo 1940 ĉ. 3000 bjalistokanoj estis deportitaj al Kazaĥio kaj Siberio, de kiuj 90% pereis en sovetiaj lagroj. Ankaŭ poste kelkmil homoj perforte devis forlasi la urbon, kaj 25 000 poloj estis mortigitaj en Katyń. Entute la sovetia teroro de tiu periodo, kiu furoris en Orienta Pollando, kostis 430-440 000 viktimojn.[18]
La 22an de junio 1941 en la urbon revenis la germanoj kun bomba atako, por okupi ĝin duan fojon. La 'Bezirk' Bjalistoko, aligita al ‚Gau' Orientprusujo, troviĝis kun Grodno ekster la ĝenerala gubernio (kie situis Treblinka).
Kadre de la dua okupado de la sovetia armeo (1944-45) la teroro de NKVD[19] direktiĝis kontraŭ la pola inteligencio kaj la Patrujo armeo. Aliflanke, taĉmentoj de la Patruja Armeo (Armia Krajowa) kaj de la subtera dekstrema Nacia Armeo (Narodowe Siły Zbrojne) mortigis precipe la belorusan popolon. Sekve de la milito la nombro de la loĝantaro en Bjalistoko malkreskis al 40 000 homoj.
En 1945 Pollando perdis sian orientan teritorion al Sovetunio kaj en la aŭgusta Potsdama Konferenco la nova orienta limo de Pollando estis fiksita preskaŭ kongrue kun la iama kurzona linio. Tio signifis, ke Bjalistoko restis kun Pollando, dum aliaj gravaj urboj de la regiono kiel Grodno, Vilno kaj Lvovo estis aligitaj al Sovetunio.
Historio de la judoj de Bjalistoko: La juda dimensio de la historio de Bjalistoko, kiu dominadis tiun urbon ekde la komenco de la 19a jarcento ĝis 1939/43, estas, almenaŭ en polaj (kaj aliaj) enciklopedioj, kutime iom neglektata (aŭ traktata en specialaj ĉapitroj). Evidente la diversaj 'naciaj' memoroj ne tro ŝatas tiun temon kaj interpretas la eventojn tra siaj okulvitroj. Por dokumentiĝi pri tiu interesa kaj grava ĉapitro, formanta integran parton de la historio de Bjalistoko, necesas serĉadi kaj esploradi diversajn fontojn en pluraj nacilingvoj, por povi konstrui pli malpli kompletan bildon.
La plej detalajn informojn pri la historio de la judaro en Bjalistoko provizas la Ruslanda Hebrea Enciklopedio.[20]
La unuaj judoj atingis Pollandon en la 10a jarcento. En la sekvaj jarcentoj polaj reĝoj kaj litovaj granddukoj allogis judojn, al kiuj oni ebligis ekonomian kunlaboradon, tiel ke iom post iom la Pola-Litova Respubliko fariĝis la prosperanta civiliza centro de la judaro en Eŭropo kaj en la mondo. La evoluo de la judaj komunumoj en Pollando-Litovujo ne estis sen problemoj kaj konfliktoj, despli ke tradiciaj antaŭjuĝoj kaj sento de konkurenco komplikis la kunvivadon de la judoj kun la aliaj surlokaj etnoj (ĉefe poloj kaj poste rusoj).
Sub carino Katarino II. estis instalita (en 1791) la t.n. setla zono[21], al kiu apartenis ankaŭ la regiono de Bjalistoko-Grodno. Temis pri segregita areo, kiu etendiĝis de

[18] Zaslavsky, Victor: Pulizia di classe (itallingve), Bologna 2006; Klassensäuberung. Das Massaker von Katyn (germanlingve). Berlin 2007, p. 50.
[19] NKWD (Narodny komissariat vnutrennyĥ del: Popola komisariejo pri internaj aferoj de USSR.
[20] Ekzistas libra eldono (Moskvo 2000) kaj preskaŭ kongrua interreta versio sub www.eleven.co.il. Emfazita en la artikolo pri Bjalistoko estas la grava rolo de komunistoj dum la ribelo en la bjalistoka getto de 1943, dum apenaŭ reflektitaj restas la teroro de la sovetia okupado, dum sentebla en la prihistoria priskribo estas la kontraŭpola kaj kontraŭlitova tendencoj.

Kovno/Vitebsk ĝis ĉe la Nigra Maro kaj ampleksis precipe la okcidentajn guberniojn de la Ruslanda Imperio. Ĝis la fino de la 19a jarcento ĝis 90 procentoj de la rusaj, litovaj kaj polaj judoj (ĉ. kvin milionoj) loĝis en tiu aparta zono, kiu simils al granda getto, kiun la judoj ne rajtis forlasi por vivi aŭ labori. En ĝi formiĝis la famaj judaj ŝtetloj. Post la venko de la februaro revolucio la setla zono estis nuligita en 1917.

Unuaj informoj pri judoj en la bjalistoka regiono (Podlaĥio) datas de la dua duono de la 15a jarcento. En 1522 alvenis unuaj judoj al la najbara urbeto Tykocin, en 1558 al Bjalistoko mem. En 1659 la bjalistokaj judoj agnoskis la superecon de la tykocina kahalo (oficiala juda komunumo). Ĉirkaŭ la hodiaŭa strato Suraska ekestis la unua juda kvartalo (nomata ŝulhojf). En la tempo de Jan Klemens Branicki kaj Izabela Poniatowska la unua ŝtona sinagogo (1715-18) estis konstruita anstataŭ pli frua ligna sinagogo. La juda komunumo (kahalo) de Bjalistoko formale fondiĝis en 1745, kiam ĝiaj anoj ricevis la statuson de rajtohavaj (privilegiitaj) civitanoj. Joŝua Ŝapiro fariĝis rabeno de Bjalistoko kaj Choroszcz. En 1764 estis konstruita la Granda Sinagogo (Alte Ŝul) de Bjalistoko. Inter 1771 kaj 1777 la bjalistoka juda komunumo atingis la aŭtonomion. En 1789 mortis la tria rabeno de Bjalistoko, Gaon Klonimus Kalman Lichtensztejn, kiu samtempe estis la unua rabeno de la memstara bjalistoka kahalo. En la jaro 1800 pluraj najbaraj urbetoj kaj vilaĝoj agnoskis la superecon de la bjalistoka kahalo. En 1803 Aron Levi Hurvic malfermis la unuan presejon por hebreaj eldonaĵoj. En 1810 naskiĝis en Bjalistoko Ĥaim Zelig Slonimski, la fondinto de la hebrea periodaĵo *Hacefira* (kiun poste longe ĉefredaktis Naĥum Sokolov, konato de L.L. Zamenhof). En la 20aj jaroj fondiĝis diversaj judaj institucioj. En 1833 naskiĝis Eleazar Halbersztadt (+1899), fondinto de la bjalistoka Haskala-movado. En 1840 la unua juda malsanulejo de Bjalistoko estis fondita de Sender Alexander Bloch, kiu ankaŭ starigis la unuan teksan fabrikon en 1842. Kun Noĥum Minc Bloch stariĝis en 1850 la unua silka fabriko en Bjalistoko. La evoluo de la teksa industrio en Bjalistoko post la napoleonaj militoj do estis forte dankinda al la judoj. En 1860 preskaŭ la duono de 44 tekstilfabrikoj apartenis al judoj. La produktado de la bjalistokaj fabrikoj en 1898 devenis 47,3-procente ĉefe de tiuj judaj entreprenoj. La plimulto de tiuj fabrikoj estis detruitaj dum la unua mondmilito.

En tiuj tempoj ankaŭ la unuaj judaj lernejoj kaj tuta reto de kulturinstitucioj ekfunkciadis. Kiam en 1859 en Bjalistoko naskiĝis L.L. Zamenhof, kreinto de Esperanto, Bjalistoko estis mezgranda industria urbo. En 1861 caro Aleksandro II. vizitis Bjalistokon kaj akceptis altrangan judan delegacion, konsistantan el Jeĥiel Ber Volkovyski, Eleazar Halbersztadt, David kaj Mordeĥaj Zabludowski kaj rabeno Johoŝue Szejnberg. Inter 1867 kaj 1873 konstruiĝis Ĥorŝul sinagogo. En 1868 la patro de Zamenhof, Marko, prezentis festparoladon okaze de inaŭguro de nova sinagogo, kiun la publikaĵo *Hakarmel* dokumentis. En 1876 en bjalistoka ĥasida familio naskiĝis Mejer Wallach, kiu poste sub la nomo Maksim Litvinov fariĝis ministro pri eksteraj aferoj de Sovetunio (1930-39); En 1940-43 li servis kiel sovetia ambasadoro en Usono. En 1878

[21] Ruse черта оседлости (ĉerta osedlosti), pole strefa osiedlenia, germane: Ansiedlungsrayon (aŭ Ansiedelungszone), angle Pale of Settlement.

naskiĝis en Bjalistoko Josef Perlman, kreinto de la unua juda teatro Habimah en Eŭropo (Bjalistoko kaj Moskvo). [22]

Evoluo de la juda loĝantaro: En 1663 ekzistis en Bjalistoko 75 judaj viroj kaj virinoj super 14-jaraĝaj, kio signifis 11,8% de la 634 loĝantoj. En 1765 vivis en la urbo 765 judoj (22,4%), en 1772 820 (44,4%), en 1807, post la fuĝo de diskriminaciataj judoj el vilaĝoj, la juda loĝantaro kreskis al 2116 personoj (t.e. ĉ. 51%) de entute 4145 enloĝantoj. En 1857 jam estis 9547 (t.e. 69-74%), en 1878 20 365 aŭ 59%, en 1895 47 783 aŭ 76%, post stagnado estis nova kresko en 1913 kun 70 000 judoj (aŭ 70%).

Post la falo dum la unua mondmilito estis rapida kresko ekde 1921 (37 186) al 140 000 (70%) en oktobro 1939 (eble eĉ multege pli en novembro) antaŭ la kompleta ekstermo de la juda popolo en Bjalistoko.[23] En 1939 vivis en la regiono de Bjalistoko ĉ. 350 000 judoj. Grandparto de tiu judaro estis malriĉaj, sendomaj kaj senlaboraj, tiel ke necesis en Bjalistoko starigi specialajn bonfarajn instalaĵojn.

En Bjalistoko vivis ankaŭ grandparto de la religiaj (piaj) judoj. En 1861 ekzistis en la urbo 18 sinagogoj kaj preĝejoj, en 1910 ilia nombro estis eĉ 97. Ekde 1859 funkciis la rabeno I.T.L. Ĥalpern, inter 1883 kaj 1898 rabeno Ŝmuel Mohilever, kiu fondis jeŝivon (altlernejon) kaj kiu estis ligita kun la movado de la *mitnagdim,* la kontraŭuloj de la Ĥasidoj. Post la morto de Mohilever la rabeno ekde 1900 nomiĝis Ĥaim Naftoli Ĥerc Ĥalpern, la filo de I.T.L. Ĥalpern. En 1908 la nova Granda Sinagogo estis inaŭgurita.

En 1896 Menaĥem Noĥum Epŝtejn fondis ĥasidan dinastion. Ĝin gvidis inter 1918 kaj 1939 lia bofilo, Meir Ŝolom Ŝĉedrovickij, lin sekvis lia filo Ŝmuel Aron.

En la unua duono de la 19a jarcento inter hebreoj komenciĝis la disvastiĝo de la ideoj de la haskalao, la juda kleriga (aŭ iluminisma) movado. En 1880 formiĝis la cionisma grupa Ĥovevej Cion. Diversaj cionistaj tendencoj trovis en Bjalistoko signifan nombron de adeptoj. Kreskanta nombro de malriĉuloj kaj laboristoj favoris la ekeston de revolucia agado. Tiel, komence de 1897 estis fondita la bazo de judaj laboristaj socialismaj grupoj kaj por la organizo Bund, lanĉita de la ginekologo Josif Rubinŝtejn. En 1900 en ĝia bjalistoka sekcio membris ĉirkaŭ mil personoj. Estis eldonitaj gazetoj, organizitaj strikoj, kiujn partoprenis multaj judoj. En 1901 en Bjalistiko okazis la unua kongreso de Bund kaj aperis la jida gazeto *Belostoker arbeter* (bjalistoka laboristo), kies redaktoro estis Pavel Rozental. Cetere, 90% de la anoj de la bjalistoka fajrobrigado estis judoj.

La pogromoj de julio 1905 kaj junio 1906 (vd. sube) kaŭzis viktimojn kaj dume bremsis la komercon kaj industrion. Aperis poalej-cionistoj kaj anarkiistoj kaj la organo de la t.n. cionistoj-teritoriistoj *Evrejskij golos* (Hebrea voĉo). Post la unua mondmilito en Bjalistoko estis fonditaj hebreaj bazaj kaj mezaj lernejoj, en kiuj oni instruis la ivriton. En 1921 93% de la komercistoj de Bjalistoko estis judoj kaj 89% de ĉiuj industriaj entreprenoj apartenis al ili. Poste la procentaĵo de judaj komercistoj iom malkreskis (78,3% en 1928).

La bjalistoka pogromo de 1906: Kontraŭjudaj pogromoj havis en Ruslando tradicion. En 1881 eksplodis pogromoj en pluraj urboj de Ukrainio kaj en Varsovio. En 1903 ili

---

[22] Nuntempe Habimah estas la la nacia teatro de Israelo en Tel Avivo. Ankaŭ Itzhak Ŝamir, premiero de Israelo (1983-84 kaj 1986-92) devenis de la proksimeco de Bjalistoko. Du jarojn li pasigis en la Hebrea Gimnazio de Bjalistoko.

Wiesniewski, Tomasz: Jewish Bialystok and surroundings in Eastern Poland. A Guide for Yesterday and Today, Ipswich, Massachusetts, 1998, p. 110-111.

[23] Wisniewski, p. 120. Kongruaj ciferoj en Rossijskaja Evrejskaja Enciklopedija (pri Belostok).

ripetiĝis en Besarabio. Kutime iu banala provoko sufiĉis. Reage al la subakviĝo de la rusa floto en la mara batalo de Tsuŝima (majo 1905) ekbrulis la flamoj de la rusa revolucio pere de kontraŭjudaj pogromoj. En Bjalistoko uniformitaj soldatoj pafis tutan tagon kontraŭ judaj preterpasantoj, tiel ke la 13an de julio la nombro de viktimoj atingis 50 personojn.

La inica provoka momento de la bjalistoka pogromo de 1906 estis atako kontraŭ eklezia procesio, kiu estis organizita kaj de la ortodoksa kaj de la romkatolika eklezio la 1an (14an) de junio 1906. Por ĉi tiu tago estis dislokitaj armeanoj, kaj al la soldatoj estis klarigite, ke la judoj estas revoluciuloj kaj malamikoj de Ruslando kaj ke ili planus atakon kontraŭ la ekleziaj procesioj. Efektive la procesioj estis atakitaj, en kiuj iu katolika pastro estis mortigita. Sekve estis provite enmiksi la polan loĝantaron en la kontraŭjudaj agresoj, sed kiel atestantoj emfazis, la poloj ne lasis enmiksi sin, se oni ignoras kelkajn sensignifajn esceptojn. Aliflanke la oficialaj peterburgaj raportoj evidente mensoge emfazis, ke la „freneziĝinta" popolo ĵetiĝis sur la judojn, kriante „For la judojn !", „for la revoluciulojn !". Do, la kontraŭjuda propagando de la caristoj ĝenerale ne estis akceptitaj en Bjalistoko aŭ konsiderita kiel nesufiĉa motivo. Pri la sekvaj marodadoj, murdoj kaj vundigoj respondecis ĉefe rusaj soldatoj kaj anoj de la fervoja personaro, dum la kontribuo de la juna plebaĉo restis minimuma. La komisiono de la dumao (ruslanda parlamento), kiu esplorigis la incidenton, konstatis, ke ne ekzistas malamo inter la kristana kaj juda loĝantaro, ke nur la polico ne kaŝis sian koleron kontraŭ la judoj, kiun ĝi motivigis per tio, ke tiuj estus revoluciuloj kaj ke ili mortigis anojn de iliaj trupoj. Estis asertite, ke la planado de la pogromo estis bone konata kaj al la aŭtoritatoj kaj al la loĝantaro, kaj ke ne povis temi pri spontana kontraŭjuda agado. La propaganda provo enmiksi la polojn en la pogroman agadon protektitan de la t.n. 'Nigraj Centaruloj'[24] do fiaskis kaj ne estis ripetita denove de la rusa flanko. Apud la raporto de la komisiono de la dumao aperis en la konservema krakova gazeto *Czas* propra raporto de korespondento el Varsovio. Estis asertite, ke ĉe la bjalistoka pogromo klare temis pri provoko flanke de la cara reĝimo, en kiu oni konsideris la eblecon, ke judaj socialistoj povis esti kapablaj provoki tian agadon. La artikolo konkludis per averto al la adreso de la judoj, ke ili prefere ne „arogante kondutu" kontraŭ la loka loĝantaro. En sekva artikolo *Czas* distanciĝis de la judaj kaj liberalaj deputitoj de la dumao, kiuj parolis pri polica agado kaj kolportis la oficialan raporton de la guberniestro de Grodno el Vilno, en kiu oni parolis pri la „ofenditaj religiaj sentoj de laboristoj kaj kamparanoj", kiuj volis puni la atenculojn de la procesio. La artikolo entenis klaran averton kontraŭ la revolucia movado, en kiu partoprenis multaj judoj. Konklude: kvankam la rusoj povis gajni por si certan pleban tavolon de la popolo por la pogromo, necesas substreki, ke la publika opinio de la poloj esprimiĝis principe kontraŭ tiaj agresoj, senkonsidere la cirkonstancon, ke eblis konstati ankaŭ la partoprenon de polaj grupoj en la bjalistoka pogromo.[25]

La periodo depost 1939 fariĝis ege malfacila kaj tragika por la bjalistokaj kaj entute la polaj, litovaj kaj orienteŭropaj judoj. Kadre de ĉi tiu mallonga artikolo la eventoj ne

[24] Temas pri dekstrema kontraŭrevolucia terororganizaĵo dum la revolucio de 1905, kiu organizis murdojn al opoziciaj politikistoj kaj kontraŭjudajn pogromojn, kiuj estis kutime protektitaj de la registaro.

[25] Golczewski, Frank: Polnische-jüdische Beziehungen 1881-1922, Wiesbaden 1981, p. 86-88.
La pogromo de 1906 estas dokumentita sub http://www.zabludow.com/bialystokpogromdavidsohn.html (The Pogrom Against The Jews. By David Sohn, from the Bialystoker Memorial Book, 1982).

povas esti priskribitaj en ĉiuj detaloj, tamen estu menciitaj la plej gravaj faktoj rilate Bjalistokon.
En somero 1941 la loĝantaro de Bjalistoko subite kreskadis post kiam 8-10 mil personoj fuĝis el la germane okupata Pollando. Samtempe centoj da judoj estis deportitaj al foraj regionoj de Sovetunio. La atako de la hitlera armeo kontraŭ Sovetunio la 22an de junio 1941 signifis la okupon ankaŭ de Bjalistoko kaj por la tieaj judoj la komencon de Shoah. La 27an de junio la germana Wehrmacht ekokupis la urbon, kaj ekde la unua tago la nacisocialistoj profiliĝis kiel senkompataj persekutantoj kaj buĉantoj de la judoj. Dum nur malgrandan parton de judoj, ĉirkaŭ 200-300 eblis evakui el la urbo, alia juda aro, ĉirkaŭ 800-1000, estis kaptita kaj enfermita en la centra (aŭ granda) sinagogo de la kvartalo Ĥanajki, kiu estis bruligita, tiel ke kun la sinagogo ankŭ la tuta juda kvartalo estis detruita. Pli ol dumil personoj tiam pereis[26], nur kelkaj judoj povis esti savitaj, helpe de pola laboristo. Inter la viktimoj troviĝis esperantisto, Morduĥ Zabłudowski, aktivulo de la bjalistoka Esperanto-Societo ‘Zamenhof’. Samtempe estis efektivigitaj aliaj masakroj, tiel ke tiu tago estas memorata kiel nigra vendredo. Ekde la 1a de aŭgusto judoj estis pelataj translokiĝi al la instaligota getto, kiu estis konstruita en nova urbokvartalo ambaŭflanke de la rivero Biała kaj kiu ampleksis kvaronon de la urba teritorio (inkluzive de la Zamenhofa stato). La tereno de la bjalistoka getto, kiu estis kontrolita de germanoj kaj ukrainaj fihelpantoj en funkcio de polico, devis sufiĉi por kvindek mil homoj, kaj ĝi rapide evoluis al industria zono kun deko da fabrikoj kaj multaj metiejoj, kiuj produktis varojn laŭ mendo de la okupantoj, kie laboris ĉefe judoj. El tio ekestis sufiĉe viglaj komercaj strukturoj. Prosperis ankaŭ la kontrabando, kaj ekzistis ankaŭ sekreta industrio, kiu produktis varojn por la gettanoj. Meze de 1942 la germanaj okupantoj malperemsis ĉian komercon en la getto. La Judenrat (juda konsilio) de Bjalistoko, kiu enkasigis impostojn de la komercejoj, estis gvidata de rabeno Gedaliah Rosenmann, poste de inĝeniero Efraim Barasz,[27] kiu estis la estro de la juda komunumo en Bjalistoko ekde 1934. Sekve estis entreprenitaj multaj klopodoj por likvidi la judojn. La estro de la civila administrado en Bjalistoko tiam estis Erich Koch (1896-1986), unu el la plej teruraj nazioj entute, kiuj fifuroris en Pollando kaj gvidis la konfiskojn de la juda posedaĵo. La 3an de julio SS-anoj pafmortigis pli ol tricent personojn, kiuj konsistigis la judan intelektularon. En aliaj amasmortigaj proceduroj de julio 1941 troviĝis pli ol kvinmil viroj kaj pli ol mil virinoj kun infanoj. Kompreneble, ĉiuj judoj devis porti la flavan stelon, kaj ekster la getto ili rajtis iradi nur laŭ certaj vojoj kaj en akompano de germanaj sekuristoj.
La vivo kaj la klopodoj je pluvivado ripetiĝis en Bjalistoko kiel en multaj aliaj lokoj, kie amaso da judoj estis persekutataj en gettoj. Organizante tutan sistemon de socialaj servoj, inter alie medicina, la gvidantoj de Judenrat klopodis savi la vivon de judoj, provizante ilin per nutraĵoj kaj havigante al ili laborlokojn en diversaj entreprenoj, kiuj produktis varojn nepre havindajn de la germana armeo kaj de la popolekonomio. La germanaj gestapanoj malhelpadis tiujn aktivecojn kaj kruele punis homojn, kiuj faris ion nepermesitan aŭ kiam oni malkovris ĉe ili armilojn. La punitoj estis mortpafitaj aŭ

[26] Laŭ Felicja Nowak: Mein Stern. Gerlimgen 2001, p. 105.
[27] Vd. Gutman, Israel: Enzyklopädie des Holocaust. Die Verfolgung und Ermordung der europäischen Juden. Bd. 1, p. 154-5; Benz, Wolfgang: Lexikon des Holocaust, München 2002, p. 24. En la 30aj jaroj Barasz veturis al Palestino por prepari la elmigradon de sia familio. En la dua mondmilito lia filo estis juda militavidila piloto de la brita armeo.

deportitaj al iu labor- aŭ mortkampadejo, ekzemple al Pruĵani aŭ Treblinka, kien la 5an de januaro 1943 estis transportitaj ĉirkaŭ dekmil gettanoj. Inter septembro kaj oktobro 1941 Judenrat sendis, laŭ ordono de la germanoj, 4500 homojn, precipe malsanajn, senfakajn aŭ senlaborajn, al Pruĵany.[28] Kelkaj sukcesis reveni al Bjalistoko, sed la plimulto estis murdita kiam la getto de Pruĵany estis likvidita en januaro 1943.

La diversaj junularaj organizaĵoj, kiuj ĉesigis sian aktivecon sub la sovetia reĝimo, restarigis sian agadon sub la germanoj: La plej viglaj organizoj estis la komunistoj, Bund-istoj kaj cionistoj (Heĥaluz-Dror, Haŝomer hazair, Betar, Hanoar Hacioni). La celo de ĉiuj tiuj organizoj estis la rezisto kontraŭ la germana okupado. En novembro 1941 ĉi tiu rezistado komencis alpreni formon. Kvankam la planoj estis malkovritaj de la germanoj, la organizado de la liberiga lukto estis daŭrigata. En marto 1942 estis fondita la Unuiĝinta kontraŭfaŝisma bloko, kiun formis membroj de preskaŭ ĉiuj subteraj grupoj troviĝantaj en la getto, inter alie komunistoj sub la gvido de jama suboficiro de la pola armeo kaj anoj de judaj-cionistaj organizoj kaj Bund-istoj. Gravan rolon en tiu procezo ludis Ĥaika Grossman[29] kaj Adek Borak. Armiloj povis esti akiritaj ĉe lokaj kamparanoj, diversaj eksplodiloj estis konstruitaj sekrete en la getto mem, kie same troviĝis pluraj deponejoj de armiloj. Fine de 1942 formiĝis ankaŭ judaj partizanaj grupoj en la ĉirkaŭaj arbaroj. La plej konata taĉmento nomiĝis Forojs (Antaŭen). Kvankam Armia Krajowa apogis judajn partizanojn en aliaj okupitaj partoj de Pollando, ĝi tute ne faris tion en Bjalistoko, sed eĉ male ne vendis armilojn al la judoj kaj murdis judajn kunbatalantojn.

Unua ribelo en la getto mem eksplodis la 5an de februaro 1943, dum kiu mortis ĉirkaŭ dektri germanaj soldatoj kaj policistoj. Post tiu sukcesa agado la nombro de gejunuloj, kiuj aliĝis al la kontraŭstarado, kreskis. Kompreninte la seriozecon de la afero, la prezidanto de Judenrat, Barasz, serĉis la kontakton kun la ribelantoj, helpis al ili akiri armilojn kaj samtempe daŭrigis sian kunlaboron kun la germanoj. En majo 1943 post malfaciloj ĉiuj judaj kontraŭstaraj organizoj sukcesis unuiĝi en unu organizon nomatan ‘Dror’, sub la gvido de cionistoj (Mordeĥaj Tenenbaum, nomata M. Tamaroff)[30] kaj komunistoj (Daniel Moszkowicz, Mošković).

Komence de aŭgusto 1943 Germanio alprenis decidon pri definitiva likvido de la bjalistoka getto. Al Bjalistoko estis sendita la fifamega SS-generalo Odilo Globočnik (1904-45), kiu estis la fifamega gvidanto de ‘Aktion Reinhardt’ en la najbara ĝenerala gubernio, en kies kremaciejoj de Bełżec**,** Sobibór kaj Treblinka estis per gaso kaj aliaj rimedoj murditaj minimume du milionoj da judoj kaj kvindek mil romaoj (ciganoj). Globočnik ellaboris la planon por la likvido de la bjalistoka getto – spertojn la germanoj kolektis jam dum la ribelo en la varsovia getto. La likvido de la bjalistoka getto komenciĝis en la nokto de la 15a al la 16a de aŭgusto. Giganta soldataro kaj armea aparataro, eĉ kun tanka kaj aviadila subteno, estis kolektita por ĉirkaŭi la getton kaj ordoni al ĝiaj loĝantoj kolektiĝi en specialaj punktoj. La plano antaŭvidis ilian translokiĝon al Lublino. La judaj subteranoj, laŭnombre ĉirkaŭ 200, eksciis pri tiu plano jam la 14an. Ili ne restis pasivaj kaj decidis elpaŝi kun heroa defenda batalo kontraŭ la

[28] La urbo situas nuntempe en Belorusio.

[29] Elstaran raporton pri la bjalistoka subtera agado ŝi postlasis al ni. Alia signifa memuaro en tiu ĉi kunteksto devenas de Felicja Nowak, kies onklo estis Jakub Ŝapiro (Moja gwiazda, my star, Mein Stern, Bleicher, Gerlingen 2001). En ŝia libro li estas menciita. Kune kun ŝia patro Ŝapiro estis mortpafita en la kamparo de Petraŝe ĉe Bjalistoko.

[30] Poste li estis komandanto de Żydowska Organizacja Bojowa.

germanoj kaj ties ukrainaj helpantoj. La celo de la ribeluloj estis trarompi la murojn de la getto por povi fuĝi en la arbarojn. Ĉi tiu plej lasta senespera kontraŭribelo daŭris ĝis la 20a de aŭgusto, kiam la municio elĉerpiĝis. La kaptitaj ribeluloj estis mortpafitaj, Moŝkoviĉ kaj Tenenbaum evidente suicidis, sed la cirkonstancoj de ilia morto restas neklara.[31] Ĉe la malsanulejo okazis ankoraŭ plej lasta batalo inter germanoj-ukrainoj kaj judaj ribeluloj gvidataj de Ĥanka Levinson. Fine, ĉiuj malsanuloj, vunditoj kaj medicinaj laboristoj trovis la morton. Sed ankaŭ la germanoj perdis multajn homojn. Laŭ iu raporto en la getto pereis ĉirkaŭ cent germanaj kaj ukrainaj soldatoj kaj policistoj, kelkcent estis vunditaj. Sed kelkaj pluvivantaj ribeluloj, kiuj kaŝiĝis en la ruinoj, nokte eliris el siaj kaŝejoj kaj atakis la patrolojn, kiuj konsistis el ukrainaj, litovaj kaj germanaj sekuristoj. La plej lasta gettoribelo okazis ĉirkaŭ la bunkro en strato Chmielna. Ĉiuj ribeluloj falis. De aliaj nur malmultaj sukcesis fuĝi kaj aliĝi al la partizanoj. La plej lasta konata provo fuĝi okazis en oktobro 1943, sed jam neniu plu sukcesis eskapi. Kelkcent ribeluloj pereis dum la bataloj aŭ estis buĉitaj post la fino de la ribelo.

Dum la likvido de la getto verŝajne multe pli ol tridek mil personoj estis deportitaj al la mortkoncentrejoj de Majdanek kaj Aŭŝvico-Birkenau, kie troviĝis la fifamegaj gasĉambroj. Okazis ankaŭ jeno, ke la germanoj forportis ĉirkaŭ 1200 judajn infanojn kaj 40 plenskreskulojn al la koncentrejo Theresienstadt (Terezín) en Bohemio, de kie ili estis pludeportitaj al Aŭŝvico, kie ili estis murditaj. Restintaj okcent judaj laboristoj, kiuj estis bezonataj por malmunti fabrikajn konstruaĵojn en la getto, estis post la fino de la laboro transigitaj al Majdanek kaj likviditaj, ankaŭ Barasz, ties edzino kaj la membroj de la bhalistoka Judenrat trovis sian morton tie, pri la cirkonstancoj de ilia morto nenio estas konata.[32] Ĉirkaŭ cent personoj povis fuĝi el la getto mem aŭ dum transportoj al koncentrejoj. Fine la germanoj celis ankoraŭ disbati la partizanan movadon, sed tiu plano evidente malsukcesis. En aprilo 1944 la bjalistokaj partizanoj renkontis sovetian partizanan brigadon al kiu ili aliĝis por esti dislokitaj. Post la fino de la milito pluvivis nur ĝis kvincent judoj el Bjalistoko. Ankaŭ la plimulto de la bjalistokaj esperantistoj pereis en tiu tempo. La bjalistoka Esperanto-grupo ZES nombris tricent membrojn. La plej elstara el ili, Jakobo Ŝapiro, prezidanto de ZES, estis arestita kaj kune kun kelkmil judaj viroj mortpafita en la kampo de Pietraŝe la 12an de julio 1941. Lia edzino Ewa pereis en la lasta likvido de la bjalistoka getto okazinta inter la 16a kaj 18a de aŭgusto 1943. [33]

En aŭgusto 1944 Bjalistoko estis okupita („liberigita") de la sovetia armeo. En la bjalistoka vojevodio estis murditaj ĉirkaŭ ducent mil judoj. Entute ses milionoj da tute senkulpaj judoj pereis dum la holokaŭsto. Eŭropo estis purigita de la „laŭsoj de la civilizita homaro" (Goebbels). Proksimume 200 judoj el Bjalistoko postvivis en koncentrejoj, kelkdekoj en la 'aria' parto de Bjalistoko, sesdeko savis sian vivon inter partizanoj en arbaro. Post judfobie motivitaj agadoj kadre de la komunisma antisemitismo en la 1950-60aj jaroj praktike ĉiuj polaj kaj bjalistokaj judoj elmigris al Israelo, Usono aŭ aliaj landoj. En 1997 restis nur kvin judoj en Bjalistoko, ŝajnas ke

[31] Benz, Wolfgang: Lexikon des Holocaust, München 2002, p. 231.

[32] La 3an de novembro 1943 en Majdanek estis ekzekutitaj 18 400 personoj, supozeble ankaŭ Barasz kaj Rosenmann. Iuj estis murditaj ankaŭ en Poniatowa kaj Bliżyn.

[33] Vd. Banet-Fornalowa, Zofia: Historio de Esperanto-movado en Bjalistoko, Svidniko 2003, p. 130-135.

antaŭ kelkaj jaroj la lasta judo bjalistoka, kiu rajtis fari judajn ceremoniojn, mortis. En diversaj lokoj de la urbo estis intertempe starigitaj memorialoj honore al la viktimoj.[34] Nuntempe Bjalistoko troviĝas denove proksime de grava limo, tiu de la Eŭropa Unio, kiu estas bone ŝirmata kontraŭ la parto de la mondo, kiu komenciĝas oriente de tiu limo. Ankaŭ nuntempe Bjalistoko estas multetna. Kiel minoritatoj vivas ĉirkaŭ 7500 blankrusoj, kio estas 2,5% de la loĝantaro, ĉ. 10-15 000 rusoj, 1800 tataroj kaj kelkcent ukrainoj, krome romaoj (ciganoj). Koncerne la religiojn, en Bjalistoko rezidas la romkatolika ĉefepiskopo; Bjalistoko estas la sidejo de la diocezo de la bjalistoka-gdanska Pola Aŭtokefala Eklezio Ortodoksa. En Bjalistoko ekzistas diversaj protestantismaj eklezioj kiel luterana, baptista, adventista, k.a., krome ekzistas mormonoj kaj islamanoj (kiuj kongruas ĉefe kun la tataroj). Ĉiu de tiuj etnaj kaj konfesiaj grupoj posedas sian kulturan kaj religian centron.

Kompilis Andreas Künzli

[34] Liston de elstaraj judaj civitanoj de Bjalistoko, inter alie kun la mencio de L.L. Zamenhof, publikigis Rossijskaja Evrejskaja Enciklopedija, Moskvo 2000, p. 108-9. Ĉi tiu listo mankas en la ĉi-koncerna artikolo de la elektronika versio. Malgrandan enciklopedion kun biografietoj pri elstaraj bjalistokaj judoj provizas Wisniewski, p. 115-119.